

**dr. sc. ZLATKO HINŠT, dipl. oec., prof.**

**Scienca prelego en kadro de SUS30 en Rimini (02-09.09. 2007)**

## **SIGNIFOJ DE TERMINOJ POR BAZAJ NOCIOJ PRI MERKATO**

### **RESUMO**

Vikipedio enhavas, interalie kampon de ekonomiko, inkluzive mikroekonomikon. Atingebla estas esperanta teksto pri koncerna kampo. Estas grave pritrakti pri fenomeno de sinonimoj kaj homonimoj en ekonomiko, pli precize en kazo de mikroekonomikaj bazaj nocioj pri merkato. En mezo de nia atenteco kaj intereso estas terminoj pri mendado kaj ofertado uzataj kiel „popularaj“ esprimoj (Vikipedio). Sed aliflanke oni mencias eblecon „en ekonomiaj faktekstoj“ de lingvo-uzo de terminoj proponado kaj postulado kiel oni nomas terminoj el Internacia Komerca Ekonomika Vortaro (IKEV) kiujn ofte oni uzas en revuo „Monato“. En Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV) ekzistas ambaŭ eblecoj - ofertado kaj mendado kaj proponado kaj postulado. IKEV eksplikas terminon „oferto“ kiel specialan signifon (skribita formo de oferta). Aliaj fakvortaroj, kiuj estos ankaŭ prezentitaj tiuaspekte, preferas «postul(ad)o»-n kaj «propon(ad)o»-n. Interesaj estas unuopaj ĝeneralaj vortaroj (oni prezentos anglaj, germanaj, francaj, italaj, rusaj, serbo/kroataj) kiuj enhavas multajn terminojn kun reale diversaj signifoj. Al ĉi-tiu fakto klare indikas Universala Vortaro kiel parto de Fundamento de Esperanto – unuavice al signifoj el naciaj lingvoj. Interalie oni turnos al aliaj internaciaj lingvoj (Ido, Interlingua, Interlingue). Mi rekomendas uzadon de neologismoj „ofro“ kaj „domando“ kiel unikaj terminoj por nur po unu aparta fenomeno kiuj ne intemiksas kun pluraj signifecoj kiel en ĝisnuna lingvo-uzo. Restas permanenta demando – kiuj terminoj estas ĝustaj, respektive kie kaj kiam. Tielmaniere Esperanto (ILO) fariĝas pli preciza lingvo en faka/scienca agado, evitante eventualajn miskomprenojn kaj atingi novan kvaliton kiel avantaĝon laŭ aliaj lingvoj.

Gravaj vortoj: nunaj terminoj: propon(ad)o, postula(ad)o, ofert(ad)o, mend(ad)o; neologismoj: ofro kaj domando, inkluzive iliajn samsignifajn aŭ du/plursignifajn nociojn en aliaj lingvoj


### **ENKONDUKA NOTO**

Mi jam verkis kelkajn artikolojn pri koncerna afero en kunteksto de prezentado de problemoj de signifoj (vidu revuo de IKEF- Internacia Komerca Ekonomia Fakgrupo „La Merkato“ – numeroj 86, 87 kaj 89 atingeblaj rete per [www.ikef.org](http://www.ikef.org)). Ankaŭ mi faris artikolon en mallonga formo kun difinoj por „Terminara Kuriero“ aperiginta en n-ro 125 (komunikilo de Terminara Sekcio de Faka komisiono de IFEF-Internacia Fervojista Esperanto-Federacio). Ĉi-tiu proponita prelego, estas la plej ampleksa trarigardo de diversaj aspektoj de menciitaj terminoj. Teksto en Vikipedio estas fake korekta. Mi ne havas riproĉojn por eksplikado de merkataj fenomenoj esperantlinve prezentita en reto. Mia intenco estas plibonigi la lingvon solvante ambiguecojn en esprimoj kiuj povas resti en uzo por pli precizaj signifoj limigitaj al ili. Mia prelego, kompreneble, estas siaspeca reago al Vikipedio, sed okazo por aktualigi unu gravan temon pri internacia lingvo en kunteksto de ĝi mem kaj komparado de pluraj eŭropaj lingvoj. Sen tia interveno en Esperanto (ILO) restas problemoj en interkompreniĝo, agado, fakscienca laboro kaj en (maŝin)tradukado. Kaŭze de koncerna teksto estas grave ekspliki problemon de signifoj por ekonomiaj terminoj kaj (inter)lingvistikaj aspektoj. Tio estas okazo

por prezenti koncernajn problemojn kaj proponojn en kadro de AIS-Akademio de la Sciencoj San Marino, inkluzive eblecon por informi kaj postuli prijuĝon de Akademio de Esperanto. Tiel ankaŭ povas ekesti favoraj cirkonstancoj por plibonigi PIV-on (nova eldono) kaj aliajn vortarojn (fakaj kaj ĝeneralaj).

## VIKIPEDIO – MIKROEKONOMIKAJ TERMINOJ PRI MERKATAJ NOCIOJ

En Vikipedio en Esperanto (pere AIS San Marino) estas prezentataj ekonomikaj terminoj, inkluzive mikroekonomikon. Estas difinitaj kaj priskribitaj terminoj “ofertado kaj mendado” kiuj oni konsideras kiel kutimaj por ĉiutagaj bezonoj. Krom tio oni mencias terminojn “proponado kaj postulado” kiel fakajn, uzitajn en IKEV – Internacia Komerc-Ekonomika Vortaro, kaj precipe uzataj de kunlaborantoj en revuo “Monato”. En repaĝo de Vikipedio sub Ekomomiko – Mikroekonomiko – Mendado kaj ofertado teorio) troviĝas kurboj de ofertado kaj mendado kun mallonga teksto kiel klarigoj pri influo inter variabloj de kvanto kaj prezo.



En Vikipedio interalie oni prezentas enhavon pri unuopaj sciencoj en Interlingua, Interlingue kaj Ido – inkluzive vortarojn de menciitaj lingvoj kaj Esperanto. Koncernaj terminoj estas tiaj:

En Interlingua koncernaj terminoj “offerta e demanda” - en Interlingue “oferta e demande”

En Esperanto-Ido vortaro estas koncernaj terminoj en formo de verboj:

postuli – postular; proponi – proponar; mendi – komendar

En Ido-Interlingua vortaro estas koncernaj terminoj kiel sekvas:

ofrir – offerer; proponar – proponar; postular – exigir; komendar – comandar.

En angla-Interlingue (Occidental) sub “demand” estas: exigir, demander, postular, demande, beson – tio estas pruvo por plursignifaj vortoj en Interlingue (kiuj jam ekzistas en angla)

Sub “supply”- furnir, munir (per), liverar, provisionar, provision, assortiment

Sub “order” – ordine, arangement, regulament; condition, statu; (command) comande, decree; (class) rang, classe; (comm.) comende: (money order), mandate; (decoration & ecl.)

órden. in order to: por. in order that: porque; commander (comm.) comendar; (set in order) ordinar.

## **PLENA ILUSTRITA VORTARO – KONCERNAJ TERMINOJ**

sur paĝo 684

mend/i – postuli, ke iu faru ian poste pagotan servon aŭ liveru ian poste pagotan komercaĵon

mend/ad/i – regule, laŭbezone mendi, precipe pp homgrupo, societo, publiko

mend/ad/o – tuto de la mendoj pri varoj aŭ servoj, kiujn konsumantoj kapablas akiri en difinita tempo k je difinita prezo - postulado, ofertado

mendilo – surskribota folio por mendi

mendolibro – libro, en kiu komercisto, industriisto enskribas la mendojn de siaj klientoj

antaŭ/mendi/i – (libron, albumon ktp); mal/mend/i – nuligi mendon

sur paĝo 756

ofert/i – proponi (varon) al kliento

ofert/o – ago de iu, kiu ofertas; fari allogajn ofertojn

ofert/ad/o – kvanto el unu varo aŭ servo, kiu povas esti vendata sur unu merkato je difinita prezo; la leĝo pri ofertado kaj mendado - proponado

sur paĝo 853-854

postul/i – 1 firme esprimi sian volon, ke iu donu aŭ faru ion, kion oni rajtas havi; 2 fari, ke io estu necesa, nemalhavebla; 3 postul/ad/o mendado; postul/ad/i – mendadi; postul/atec/o –

grado, laŭ kiu varo estas postulata; postul/em/a – inkлина multon postuli, ne facile kontentigebla; de/postul/i – postuli tion, kio apartenas al ni k je kio ni estas senigitaj;

kontraŭ/postulo – formita de defendanto kontraŭ tiu, kiu la unua faris postulon kontraŭ li ĉe la sama jurisdikcio; ne/postul/em/a – inkлина ne tro postuli, akcepti kompromisojn; re/postuli –

ke ono redonu tion, kion oni prunte ricevis

sur paĝo 877

proponi/i – 1 prezenti al ies juĝo; antaŭmeti diskutaĵon; 2 – prezenti al iu ion ne petitan, po ke tiu disponu pri ĝi

tio, kion iu proponas; propon/ad/o – ofertado: la proponado de laboro superas ĝian postuladon

kontraŭ/propono – kiun oni kontraŭmetas al unu antaŭa, por ĝin plibonigi aŭ tute transformi; pli/proponi en negoco, aŭkcio ks, proponi pli altan prezon, ol la antaŭaj proponintoj.

## **EL UNIVERSALA VORTARO (FUNDAMENTO DE ESPERANTO)**

En Universala Vortaro estas enhavitaj tri verboj ligitaj kun koncernaj terminoj en adekvata formo de ĉi-tiu verko (L. L. Zamenhof: Fundamento de Esperanto, dekunua eldono, Edistudio, Pisa, 2007, p. 138, 152-153). Mankas verbo/substantivo “ofert-i/o”. Jen koncernajn verbojn esperantlingve kun francaj, anglaj, germanaj, rusaj kaj polaj vortoj:

mend´ - mander, commerte /commit/bestellen/zakazivati/stalować

postul´ - exiger, reqérir /require, claim/ fordern/trebovati/žadac

propon´ - /proposer, offrir/ propose, suggest/ vorschlagen /proponować.

## **ESPERANTA-NACILINGVAJ KAJ VS VORTAROJ**

Angla-esperanta vortaro de P. Benson

demand – postuli; postulo/mendado; demand from someone – pretendi, depostuli, depostulo, aserti, reklamaci  
supply – provizi (iun per io); they supplied information to us – ili provizis nin per informoj, liver(ad)o, liver(aĵ)o  
supply and demand – ofertado kaj mendado.

Esperanta- angla kaj angla-Esperanto vortaro de J.C. Wells  
proponi – propose, offer  
postuli – demand, require; postulo – demand  
supply – provizi, liveri-i, -oj, plenumi, anstataŭanto  
supply and demand – oferto kaj mendo  
mendi, -o – order, book(ing)  
offer – proponi, oferti.

Franca-esperanta vortaro de R. Léger-A. Albault  
Mallongigoj: com=komerca, jur=jura, ts=ĉiuj sencoj de la franca vorto  
demande (com) – mendo, postulo; sur demande – laŭmende; demandeur – postulanto (jur)  
offre (ts) – propono; offre (com) – oferto; offrir – proponi (com): oferti – doni, prezenti;  
postulant – petanto, kandidato; postuler (demander, soliter); peti, petadi – propeti;  
exigence – postul(ad)o; exiger – postuli; conditioner – kondiĉi, necesigi; exigeant -  
postulema, tropetema; exigeable (jur) postebla.

Germana-esperanta vortaro de H. Wingen  
Angebot – propono, oferto  
Nachfrage – demando, postul(ad)o, deziro  
Fordern – postuli; Forderung (Geld) – (mon)postulo, pretendo.

Germana-esperanta vortaro de E.-D. Krause  
Angebot – oferto, propono, proponado; Angebot machen – fari proponon  
Nachfrage – postulado, demando, informpeto (Wirtsch.)  
Bestellen, Bestellung aufgeben – mendi; Besteller – mendanto, mendinto.

Esperanta-germana vortaro de E.-D. Krause  
proponi – vorschlagen, beantragen: propono – Vorschlag; Antrag, Anerbieten  
postuli – fordern, verlangen; postulo – (An-)forderung, Verlangen  
mendi – bestellen; mendo – Bestellung; kontraŭmendi (malmendi) – abbestellen, einen Auftrag annullieren  
oferti – anbieten (zum Verkauf), anbieten; oferto – Angebot, offerte.

Itala-esperanta vortaro de C. Grazzini  
domandare (interrogare) – demandi, chiedere, peti; richiesto – peto, postulo; a richiesto – laŭ mendo, richiedere – peti, postuli  
proporre – proponi, projekti, intenci  
offerta (azione di offrire); ofero (cio che si offre); offrire (oferi) – oferti.

Esperanta-rusa vortaro de E. Aleksandrevich-E.A. Bokarev  
oferti – predlagati; oferto – predloženie  
proponi – predlagati; proponi kandidaton – vidvinjiti kandidata  
postuli – trebovati, nastoiĉivo prositi; postulo – trebovanje, stros  
oferto kaj postulo – predloženie i stros.

Serbokroata-esperanta vortaro de A. Sekelj

naruĉiti – mendi; naruĉivanje – mendado

ponuda – propono, oferto; ponuditi – proponi, oferti; ponudaĉ – ofertanto, proponanto

potraŝnja – serĉado, postulado, aĉetemo\*; potraŝivanje - kredito, postulo.

\*vorto “aĉet-em-o” (el leksemo “aĉet” kaj morfemo kiel sufikso “em” kun o je la fino por substantivo) estas pli proksima al signifo de angla termino “propensity to consume” (plena nomo estas “marginal propensity to consume”) ol en signifo de merkata postulado/mendado.

Esperanta-serbokroata vortaro de S. Živanović-M. Gjiwoje

mendi – poruĉiti, naruĉiti; mendilo – narudŝbenica

ofert-i (komerca) – oferirati, (po)nuditi; oferto kaj mendo – ponuda i potraŝnja

postul-i – zahtevati, traŝiti; pretend-i – pretendirati, polagati pravo na, zahtevati

propon-i – predloŝiti, (po)nuditi.

Vortaro Esperanto – Kroatserba Kroatserba – Esperanto de F. Gruić-J. Pleadin-A. Kocian-A. Ŝimunić. Post disfalo de eksa Jugoslavio tio estas sola kroatlingva vortaro en memstara Kroatio (nun fariĝis Esperanta-Kroata kaj vs Vortaro). En ĝi ekzistas nur verboj: kroatlingve “ponuditi” kiel esperanta “proponi”, “oferti” kaj “traŝiti” kiel e-a “postuli”, “serĉi”.

## FAKAJ VORTAROJ

Internacia komerca-ekonomika vortaro en naŭ lingvoj – English – Esperanto – Deutsch – Español – Français – Italiano – Nederlands – Português – Svensk, 1975 – sub numeroj

416 claim – postulo – Forderung – exigencia – demande; exigence – reclamo – vordering; eis – exigência – krav (-et)

719 demand – postulo – Nachfrage – demanda – demande – domanda; richiesta – vraag – demanda; procura – efterfrågen

720 demand inflation – elspeza inflacio; postula inflacio – Kaufinflation; inflationsbedingungter Kaufanstieg – inflación de gastos – inflation par la demande – inflazione delle spese – bestedingsinflatie – inflação de despesa – köpinflation

1757 offer – oferto – Offerte; Angebot – oferta – offre; proposition – offerta – offerte; aanbod – oferta – offert; anbud

1758 offer (to) – oferti – offerieren; anbieten – ofrecer – offrir; proposer – offrire – offereren; aanbieden – oferecer - offerera

1785 order (to) – mendi – bestellen – encargari; hacer un pedido – commander – commissione – bestellen – encomendar – beställa

2499 supply – proponado – Angebot – oferta – offre – offerta – aanbod – oferta; tillgång; utbud (-et)

2501 supply and demand – propon(ad)o kaj postul(ad)o – Angebot unud Nachfrage – la oferta y la demanda – l’offre et la demande – offerta e domanda – vraag en aanbod – oferta e demanda – tillgång och efterfrågen.

Economie Finance Monnaie, Glosaro de EK 1985, esperanto - français – english, Versio de IKEF 1992 - sub numeroj

560 kredita postulado – demande de crédit – demand for credit

561 kredita proponado – offre de crédit – supply of credit

839 postulita kapitalo – capital appelé – called-up capital

990 enlanda postulado; interna postulado – demande intérieure; demande interne – internal demand; domestic demand; home demand  
991 eksterlanda postulado – demande extérieure; demande externe – external demand; foreign demand  
992 postulado al ekstero; postulado de eksterajoj – demande étrangère – demand abroad  
993 totala postulado – demande globale – global demand; overall demand; aggregate demand  
1075 postulado pri mono – demande de monnaie – demand for money.

Sindikata Terminaro (de H. Wiersch), (germana – angla – franca – Esperanto), IKEF – sub numeroj

71 Arbeitsuchender – job seeker; job applicant – demandeur d'emploi – laborpostulanto/petanto  
228 Lohnforderung; Gehaltsforderung – wage claim – revendication salariale – salajra postulo  
377 Arbeitsanforderungen – job requirements – exigences du travail – laboraj postuloj  
406 Forderung – claim – revendication – postulo.

Borsa terminaro kvinlingva, Deutsch – English – Esperanto – Français – Nederlands, (H. Wiersch), IKEF – FEL, 2004

0086 eine Option andienen – to proffer an option – oferti opcion; proponi opcion – offrir une option – een optie aanbieden  
0145 bezahlt Brief “bB” – sellers over; more sellers than buyers – propono superas postulon; propona pluso – comptant vendeur – gedaan en laten  
0146 bezahlt Geld “bG” – buyers over; more buyers than sellers – postulo superas proponon; propono pluso – comptant acheteur; (cours m) demandé – gedaan en bieden  
0482 Geldkurs; Ankaufskurs – demand rate; demand price; quid quotations; buying rate; bid price – achetada kurzo; demanda kurzo – cours m de la demande; cours m acheteur – cours demandé – aankoopkoers; biedkoers  
0485 Geld repartiert – reduced demands – reduktitaj demandoj – demandes fpl réduites – gereceerde aanvragen  
0699 starke Nachfrage; Run – great run – vigla postulado; forta postulado – vive demande; forte demande – sterke vraag  
0700 Nachfragekurs – bid price – achetista kurzo; demanda kurzo – cours m acheter; cours m de la demande – vraagkoers.

Railway Dictionary UIC, Fervoja Terminaro Esperanto-Français Français-Esperanto, Budapest, 1997 kaj UIC Railway Dictionary, Hungarian-English-German-French, Union Internationale des Chemins de fer, UIC RailLex, MAV Rt., 1997 – terminoj sub signoj (transprenita el artikolo de Z. Hinšt «Problemo de signifoj de ekonomiaj terminoj en Fervoja Terminaro (UIC Dictionary)», La Merkato, n-ro 89 (julio 2005), p. 9-15 kaj laŭ elekto de aŭtoroj el koncernaj vortaroj

besoins en matière de transport (MA10) – traffic requirements – Transportbedarf; transportnachfrage; Verkehrsanforderungen; Verkehrsbedürfnisse – transportbezono (ankoraŭ tri foje ripetas samajn signifojn kaj terminojn).

el FT

demande NT30 – enquiry ENG – Stationsaufforderung ENG - postulo stacia  
demande d'indemnité VS 20 – claim for compensation – Erstattungsantrag - kompenspostulo  
demande de détaxe VS20 – claim for a reduction; claim for a refund – Erstattungsantrag; Rückerstattungsgesuch - repagopostulo  
demande de l'état NT30 – status enquiry – Zustandsabfrage - pridemandado de stato

demande de mutation PS10 – application for transfer – Versetzungsgesuch - peticio pri alioficigo; peticio pri deĵortranslokigo  
 demande de secours (traction) PR70 – request for assistance (tractive unit failure) – Anforderung von Hilfe (Zugförderung) - helpopeto (trakcio)  
 demande de service OD30 – service enquiry – Dienstanfrage - demando serva  
 demande de transport MA20 – request for transport; transport demand – Verkehrsnachfrage - transportbezono  
 demande de voie /a-/ (block) PR60 – single-line block system requiring prior line – clear authority – mit Mitwirkung der nachgelegnen Blockstelle - petante pri libertrako (blokinstalaĵo)  
 demande de voie PR60 – offering of a train; train offering – Anbieten eines Zuges - trajnveturon proponi  
 demande de wagon VS40 – car order; wagon request – Wagenanforderung; Wagenbestellung - vagonmendo  
 demande pour emettre NT20 – request to send – Sendeteil einschalten - sendilon ekfunkciigi el FT  
 offre de transport (MA30) – transport offer; transport supply – Beförderungsangebot; Transportangebot; Werkehrangebot - transportoferto  
 modèle de maximisation d l'utilité (PC30) – modelo de pasaĝertrafikofertoj por utilecmaksimumuigo  
 modèle de multimodal (MA10) – modelo de trafikpostuloj konsidere al ĉiuj trafikiloj  
 modèle de unimodal (MA10) – modelo de trafikpostuloj konsidere al unu trafikilo.

RailLexic 3.0., UIC, CD-ROM, 2002

demand model (disaggregate-) (PC30, MA20) – disaggregiertes Nachragemodell – désagrègé modèle de demande – modelo della domanda disaggregata – modelo de trafikpostuloj laŭ pasaĝerenketo  
 request for route, rate... (VS20) – Beförderungsweg, - Tarif... - revendication d'itineraire, de tarif; Absendervorschrift – richiesta di itinerario, di tarifa...- postulo de ekspedanto (itinerio, tarifa)  
 service provided (VS20) – Leistung angebot – service offert – servizio offerto – oferto priservada  
 supply (of coaches, wagon) (VS40) – furniture (de voitures, de wagons) – Wagenstellung (Reisezug – Güterwagon) – forniture di carrozze, di carri – vagondisponigo  
 supply (of empty wagons) (VS40) mise à disposition (d'un wagon vide) – Lehrwagenbereitstellung – messa a disposizione di un carro vuoto – disponigo de vakvagono.

UIC Railway Dictionary, 2005 – terminoj sub signoj  
 water supply – akvoprovizado (tri kazoj sub sama angla termino).

## **SCIENCOFAKAJ LABORAĴOJ – DU EKZEMPLOJ**

En studmaterialo por kurso dum la 11-a Sanmarina Universitata Semajno (SUS 11) en aŭgusto kaj septembro 1992 de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) sub titolo “Trafiko – La merkato de trafikservoj (Priskribo de la trafiko), la aŭtoro d-ro Werner Bormann uzas terminojn “proponado” kaj “postulado”. Pli prezice en kunteksto de ĉapitrotitoloj estas uzitaj “proponado en la trafikmerkato” kaj “postulado en la trafikmerkato”. Krom tion unu ĉapitro estas titolita “Plenumo de merkatoj”. La aŭtoro estas unu el kunlaborantoj en IKEV (redaktinte germanan parton de la vortaro).

En faklaboraĵo “Al merkatesploroj – notoj el du sinsekvaj staĝoj” atingebla sur TTT-paĝoj de IKEF ([www.ikef.info](http://www.ikef.info) aŭ [www.ikef.org](http://www.ikef.org)) sur menuo – eldonoj, la aŭtoro Daniel Durand uzis terminojn “oferto” kaj “mendo”.

## **LETEROJ - REAGOJ AL ARTIKOLO EN TERMINARA KURIERO n-ro 125**

Post aperigo de artikolo “Kiel pli precize apliki ekonomiajn terminojn” en Terminara Kuriero n-ro 125 (julio 2005) mi eksciis pri du reagoj. Jen menciitaj reagoj.

D-ro Werner Bormann, prezidinto de Akademio de Esperanto, profesoro pri ekonomiko, vicdekano pri humanistiko kaj fakarestro pri sociaj sciencoj de AIS San Marino, negative reagis al artikolo “Kiel pli precize apliki ekonomiajn terminoj – tri kazoj kun multaj detaloj” en Terminara Kuriero (komunikilo de sama Sekcio) n-ro 125 en sekvonta numero 126 (oktobro 2005) de Terminara Kuriero. Li akcentis ke ZH enkondukas neologismojn kaj ekestas problemo de Esperanto antaŭ la jaro 2005 kaj Esperanto ekde tiu jaro. Li konstatis ke tielmaniere Esperanto fariĝas nestabila projekto kun multe da ŝanĝoj. Post tio estas pli malfacile pledi por Esperanto ĉe Eŭropa Unio. Interesa estas reago de d-ro Bormann en kunteksto de lia zorgo pri “libroj ktp kiuj perdus sian valoron”. Laŭ s-ro Bormann ankaŭ ekzistas problemo en eŭropaj institucioj “kiam ni pledas por nia afero” kaj proponoj gvidas al stato kia estas “adiaŭ bela revo pri neŭtrala mondlingvo”. Mi respektas zorgojn, sed vera demando estas kiu devas zorgi pro kio kaj pri kio, en kiu celo. Mia respondo al d-ro Bormann (al/pere redaktoro de Terminara kuriero d-ro Heinz Hoffmann) estas siaspeca parto de enhavo kaj senco de ĉi-tiu artikolo.

Pozitive reagis en sia letero sendita la redaktoro de TeKu kunlaboranto de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de Internacia Fervoja Esperanto-Federacio (IFEF) Zdeněk Polák, inĝeniero-ekonomikisto kaj universitata pedagogo kiu subtenas enkondukadon de menciitaj neologismoj kaj por koncernaj klarigadoj.

En korespondado kun membro de IFEF Terminara Sekcio s-ro Ludoviko Sekereš, okaze de lia reago al mia artikolo “Kiel pli precize apliki ekonomiajn terminoj – tri kazoj kun multaj detaloj” en Terminara Kuriero (komunikilo de sama Sekcio) n-ro 125 (julio 2005) mi pritraktis liaj ekspozitaj terminoj. Li menciis en sia letero (de la 5-an de julio 2007) sekvontajn sinonimojn: bezono, postulado, mendado, prefero kaj pretendo en signifo de serba kaj kroata lingvo kiel “potražnja”. Li proponis ankoraŭ novan terminon “serĉateco” kiu respondas al hungara vorto “kereslet” (potražnja). Aliaj partoj de letero estas ankaŭ interesaj kaj mia respondo estas unupartie enhavata en ĉi-tiu artikolo.

## **LINGVA ANALIZO DE KONCERNAJ TERMINOJ**

Pri nacilingvaj kaj vs vortaroj

En nacilingvaj-Esperanto kaj vs vortaroj mal pli-pli estas evidenta fenomeno de homonimeco kaj sinonimeco de koncernaj terminoj. Antaŭ akcentado de esperantaj terminoj, estas grave konstati ke en plimulto da naciaj lingvoj, malgraŭ homonimoj kaj sinonimoj por koncernaj terminoj ekzistas unueco por apliki unikajn solvojn por “ofertado kaj mendado”/“proponado” kaj “postulado”. Ekzemple anglalingve “supply and demand”, german- “Angebot und Nachfrage”, franc- “offre et demande”, itala- “offerta e domanda”, rus- “predloženie i stros”,



kroata/serba “ponuda i (po)tražnja” ktp. Menciitaj sintagmoj kaj unuope uzataj terminoj estas rekoneblaj en ekonomika kaj simila literaturo (scienco, fako) kaj ekonomia praktiko.

Problemo de signifo inter alie komplikas, ekzemple laŭ formo kontrara terminoj, kiel estas “postuli” kaj “depostuli”. En germana lingvo intermiksas “demando” (Frage) pro “Nachfrage” en iliaj vortaroj al alia signifo malproksima de merkata fenomeno (eĉ ĉe altrespektinda profesoro Erich Dieter Krause). Tiel ekzistas signifoj de “postul(ad)o”, “demando”, “informpeto”. Sekvas signifoj por: propono – Vorschlag; Antrag, Anerbieten kaj postuli – fordern, verlangen; postulo – ((An-)forderung, Verlangen. Unuope, vortoj “demand” en angla kaj precipe “demande” en franca lingvo estas homonimoj. En itala lingvo “domanda” estas ankaŭ homonimo (demando, postulo). Pro tio oni okazadas eraroj kaj intermiksadoj de terminoj eĉ inter esperantistoj vortaristoj.

### Pri Universala Vortaro kaj apliko

Zamenhof ne kreis ekonomi(k)ajn terminoj, nek “proponado” nek “postulado” kaj aliflanke nek “mendado” nek “ofertado”. El cititaj verboj estas klare ke almenaŭ dusignifaj, eĉ plursignifaj vortoj ne reprezentas kvalitan bazon por krei ilin helpe de sufiksoido –ad. Ekonomikistoj kaj aliaj fakuloj (aŭtoroj) kiuj envicigis koncernajn vortojn/terminojn en fakaj, antaŭ aŭ post tio en PIV kaj interalie ĉi-tiuj vortoj estis enigigitaj en naciaj ĝeneralaj vortaroj, ne faris bonajn solvojn por fako, scienco kaj Esperanto.

### Pri Vikipedio kaj PIV

Terminoj “ofertado” kaj “mendado” en esperanta teksto de Vikipedio sekvas preferojn de Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Evidente ĝi preferas menciitajn terminojn laŭaspekte eksplicite faritaj difinoj ĝenerale pri bazaj merkataj rilatoj inter prezoj kaj kvantoj da varoj/servoj. Terminoj “proponado” kaj “postulado” PIV uzas en kunteksto de labormerkato en menciado de rilatoj inter proponata (ofertata) kaj postulata (mendata) kvantoj da laborforto. El diversaj kunteksto de uzado de terminoj “ofertado”, “mendado”, “proponado” kaj “postulado” oni ne evitas konkludo ke menciitaj terminoj estas plursignifaj, intermiksante bazajn nociojn pri signifoj kaj ago kiu povas okazi en multe da okazoj (kontinua agado). Speciale tio oni spegulas en kazoj kiam oni uzas kombinojn de kelkaj leksemoj kaj morfemoj. Fari mendon helpe de mendilon estas unu akto de privata aŭ profesia persono post kiu oni ekzistas rajto por postuli varon aŭ servon. Pli da samspecaj aktoj prezentas agon, ankaŭ regula profesia aktiveco je mendado de ion. Sendube tio influas al merkato, sed por tuta postulado en merkato oni devas uzi apartan terminon en celo de precizeco. Kompromiso estas eventuale en sintagmo “merkata postulado” kaj analoge al tio “merkata proponado”. Sed ekzistas vere aliaj lingvaj problemoj en nunaj terminoj en signifoj rilatantaj al bazaj merkataj nocioj.

Ekzistantaj terminoj “proponado”, “postulado”, “ofertado” kaj “mendado” ne respondas al konsekvente aplikataj reguloj el “Plena analiza gramatiko de Esperanto” de K. Kaloczy kaj G. Waringhien. Menciitaj terminoj signifas ke oni temas pri daŭraj aŭ ripetataj agoj pro taŭgeco de sufiksoidon –ad por esprimi tiajn kazojn (vidu paĝojn 141, 438-439, 471, Kvara, tralaborita, eldono, UEA, Rotterdam, 1980). Laŭ citita verko ĉi-tiuj vortoj estas siaspecaj pleonasmoj por ekzistantaj vortoj sen menciita sufiksoido, precipe en cirkonstancoj kiam ili akcentas daŭra ago kun pretendo por atingi novajn signifojn kiuj vere estas neatingeblaj.

### Pri fakaj vortaroj

Supozita divido en Vikipedio pri fakaj esprimoj “proponado kaj postulado” kaj populara esprimoj “mendado kaj ofertado” unuflanke prezentas sinonimojn en esperanta terminologio.

Aliflanke en Internacia Komerc-Ekonomika Vortaro ekzistas tri terminoj pro kio en ĉi-tiu kazo oni ne povas konstati absolutan sinonimecon. Terminoj “proponado kaj postulado” signifas konatan sintagmon por rektaj merkataj rilatoj inter prezoj kaj kvantoj de varoj aŭ servoj (merkato kiel malfermita maniero de aĉetado kaj vendado), sed termino “oferto” rilatas nur al skribita formo (anoncoj, afiŝoj, referencoj al klientoj, leteroj).

Stato en aliaj internaciaj lingvoj (Ido, Interlingua kaj Interlingue) montras al ekzistado de menciita problemo. Speciale tio rilatas al Interlingue (Occidental). La plej bona ekzemplo estas citita el angla-Interlingua vortaro en ĉapitro pri Vikipedio – sub vorto “order” kiu havas multajn similajn kaj diversajn signifojn.

Economie Finance Monnaie, Glosaro de Eŭropa Komunumo nur enhavas terminon “postulado” en diversaj kunteksto (kredita postulado, postulado pri mono, interna/eksterlanda postulado kaj pasiva formo por postulita kapitalo).

Sindikata terminaro diversmaniere aplikas vorton “postulo” (por persono kiu postulas postenigon – laborpostulanto (pli bona termino estas “laborpetanto”), salajra postulo kaj laboraj postuloj, kaj termino “postulo” kiu en kunteksto de ĉi-tia vortaro ne distingas sufiĉe en senco de ĝenerala sindikata postulo kaj «postulo» kiel kreditoraĵoj en ekonomia senco.

En Borsa terminaro oni miksas terminoj “proponi” kaj “oferti” kiel sinominoj, kaj krom tio intermiksas en senco de eraro en uzado de terminoj “postulo” kaj “demando”.

Pro diversaj signifoj de terminoj ekzistas problemoj en komprenado de ligoj en ĝia uzo kaj senco de nocioj. Estas evidente ke aperas fenomeno de disbranĉiĝo de la lingvoj kiu ampleksas precipe problemon de homonimoj kaj sinonimoj. Statistika analizo en artikolo «Probemlo de signifoj de ekonomiaj terminoj en Fervoja Terminaro (UIC Railway Dictionary)» plej bone montras dimenziojn de ĉi-tiu problemo (en koncernaj lingvoj).

- 16 terminoj en franca (demande kaj kombinoj per sama termino) – 1 baza termino
- nombro da terminoj en angla – 3 terminoj kiel “enquiry” kaj kombinoj, 3 kiel “claim” kaj kombinoj, 1 kiel “application for transfer”, 5 kiel “request” kaj kombinoj, 1 kiel “transport demand”, 1 kiel “car order”, 1 kiel “offering of a train” kaj “train offering”, 1 kiel “...requiring...” kaj 1 kiel “clear authority” - 9 diversaj bazaj terminoj sed entute 18 unuopaj terminoj
- diversaj terminoj en germana – 3 kiel “-aufforderung”, 2 kiel “-antrag”, 2 kiel “Anforderung” kaj kombinoj, 2 kiel “-gesuch”, 1 kiel “-abfrage”, 1 kiel “-anfrage”, 1 kiel “Verkehrsnachfrage”, 1 kiel “...Mitwirkung...”, 1 kiel “Anbieten...”, 1 kiel “Wagenbestellung” kaj 1 kiel “Sendteil...” – 11 diversaj bazaj terminoj sed 16 unuopaj terminoj
- diversaj terminoj en Esperanto – 3 kiel “-postulo...”, 2 kiel “peticio...”, 1 kiel “priedemando”, 1 kiel “demando”, 1 kiel “helpopeto...”, 1 kiel “transportbezono”, 1 kiel “petante...”, 1 kiel “...proponi”, 1 kiel “vagonmendo” kaj 1 kiel “sendilon...” – 10 diversaj terminoj sed 13 unuopaj terminoj.

En Fervoja Terminaro/Rail Lexic (tri uzitaj fontoj) ekzistas terminoj «oferto» kaj «postulo» en signifoj por bazaj nocioj pri merkato (egalsignife kiel «proponado» kaj «postulado» en IKEV en ekonomia senco, sed kun kelkaj aliaj signifoj en termino «postulo»). Krom tio oni aperas termino «bezono» unupartite kiel sinonimo al termino «postulo». Termino «propono» oni ne uzas en FT. Oni devas akcenti ke angla vorto «supply» esperantlingve en FT estas uzata kiel «disponigo» kaj «provizado» (vagondisponigo, akvoprovizado). Anglaj sinominoj «transport offer» kaj «transport supply» esperantlingve en FT estas «transportoferto».

Pri la leteroj

Estas klare ke problemo de precizeco de nunaj terminoj pri bazaj merkataj rilatoj faras unu el malavantaĝoj de Esperanto. Kiel ĉe Eŭropa Unio pledi por lingvo kiu ne havas altkvalitajn solvojn en ekonomiko, inkluzive konzekvencojn al praktika ekonomia vivo. Ne ekzistas Esperanto ĝis kaj post 2005, eĉ pli bonaj solvoj en formo de proponoj en celo de pliprecizigi la Internacian Lingvon. D-ro Bormann ne bezonas paroli pri nestabila projekto, sed estas rekomendinde pripensi pri neologismoj kiuj povas plifortigi valoron de Esperanto. Kiel estas evidente nur en PIV ekzistas du grupoj de terminoj por koncerna afero, kiu plurfoje pligrandiĝas en aliaj vortaroj kaj demando estas: Ĉu pro tio libroj ne perdas sian valoron, eĉ en kazo ke proponoj de Zlatko Hinšt ne eniru en esperanta vorta/lingva fonduso?

Se oni deziras konstati pri nuna stato en vortaroj kaj opinio de s-ro Sekereš, jen koncernajn terminojn:

oferto, propono, proponado – entute 3 vortoj/terminoj,

aĉetemo, bezono, demando, mendo, mendado, postulo, postulado, prefero, pretendo, serĉado, serĉateco (L.S.) – entute 11 vortoj/terminoj, de kiuj 8 en ekzistantaj vortaroj kaj lasta vorto kiel propono de L. Sekereš surbaze de hungara “kereslet”.

Se oni kombinas eblecoj en esprimado pere de menciitaj terminoj tio egalas kun 24 (3 x 8) kombinoj. Entute 3 x 11 estas 33 kombinoj.

## **SOLVOJ DE PROBLEMO DE SIGNIFOJ – PROPONOJ**

Por sukcese solvi menciitan problemon de signifoj pri bazaj merkataj nocioj estas necese enkonduki neologismojn kiuj dislimigas signifojn al pli precizaj areoj, restante nunajn terminojn por parto de nunaj signifoj. Ekzemple, restas “oferto” en signifo difinita en IKEV, te. estas akceptebla kaj oni devas ĝin en PIV kaj aliaj vortaroj aprobi kiel “skribitan” formon de proponado de varoj kaj servoj (ekzemple aŝiŝo de turisma agentejo). Bona solvo por “ofertado/“proponado” estas neologismo “ofro” (devenas de franca “offre”) kaj por “mendado”/“postulado” neologismo “domando” (devenas el itala “domanda”). Itala vorto “ofero” ne estas taŭga pro jam ekzistanta vorto “oferi-/o” en Esperanto (viktimo). Pro tio estas taŭga termino kiel francdevena vorto “ofro”, samtempe distingante de parenca nuna termino laŭ IKEV “oferto”. Vorto “domando” estas laŭ radiko preskaŭ sama kiel vortoj en multaj eŭropaj lingvoj (angla-demand, franca-demande, itala-domanda, hispana kaj portugala demanda). Sed diferenco laŭ menciitaj lingvoj kie menciitaj vortoj estas kutime homonimoj estas ke “domando” en Esperanto oni ne volas enkonduki tielmaniere, eĉ kun unu signifo. Ambaŭ terminoj rilatas al tutaj efikoj fariĝi(-a/-o)ntaj sur “malfermita” merkato, sen homonimaj signifoj. Unuafoje mi proponis menciitajn neologismojn en artikolo “Rimarkoj pri la libro – Lingva analizo kaj proponoj pri la «International Business Dictionary in nine languages – Internacia komerca-ekonomika vortaro en naŭ lingvoj», La Merkato, n-ro 86 (oktobro 2004), p. 12-16 kaj n-ro 87 (januaro 2005), p. 7-12. En ĉi-tiu kazo termino “mendo” restas en signifo por fari akton de havigo, respektive kiel agon de havigado. Termino “postul(ad)o” restos por rajto akiri ion dankante al pagita varo/servo kiel akto aŭ kontinua ag(ad)o. Tielmaniere restitaj terminoj povas ankaŭ ricevi pli precizajn signifojn je komparo de ĝisnuna stato.

Propono por koncernaj neologismoj estas farita en formo de substantivoj. Estas eble el ĉi-tiaj substantivoj fari verbojn aldonante al radiko -i, te. kiel sekvas: “ofr-i” kaj “domand-i”. Sed por elementoj de difinoj estas plu eble fari per ekzistantaj verboj kiuj enhavas adekvatan

sencon kaj signifon, ekzemple “postuli” (rajto por postuli liveradon de varo post pagado ktp). En diversaj aspektoj de sciencoj, fakoj, politika kaj praktika vivo verbo “postulo” oni metas en diversaj kunteksto. Pro tio ĝia preciza uzo estas ebla en kunteksto de klarigitaj rilatoj en bone formulita frazo (postuli varon, - kontrakton, - monon, - ke iu redonu ion ktp). Verbo “proponi” estas en vortaroj kutime dusignifa (ekzemple, respondas al signifoj kiel estas: proponi varon, - buĝeton, - politikan solvon). Estas neprecize uzi kreitajn substantivojn el menciitaj verboj. Estas precize uzi substantivojn kiuj havas nur po unu signifo por difinita nocio. Ankaŭ estas eble uzi substantivojn, inkluzive adjektivojn kaj adverbojn kun aktivaj kaj pasivaj participaj finaĵoj kaj participoj mem en modoj de tri tempoj de indikativo kaj kondicionalo, inkluzive volitivon kaj infinitivon aŭ kiel elementojn de kompleksaj tempoj kiuj sekvas (vidu Plena analiza gramatiko de Esperanto, p. 439-441:

ofrint-o/a/e – ofrant-o/a/e – ofront-o/a/e – estus ofrinta/- ofranta/-ofronta, esti ofrinta/- ktp  
domandint-o/a/e – domandant-o/a/e – domandint-o/a/e – estus domandinta... - esti...

orfit-o/a/e – ofrit-o/a/e – ofrot-o/a/e

domandit-o/a/e – domandat-o/a/e – domandit-o/a/e.

Krom menciitaj kazoj (aktiva kaj pasiva voĉo) estas eblaj aliaj manieroj de gramatika uzo (faktiva kaj mediala voĉo) – (vidu citita verko, p. 134-143).

Tielmaniere “ofro” kaj “domando” kiel novaj vortoj signifas nur unu nocio, havante eblecon per participoj krei novajn signifojn, ambaŭ precizaj kun klaraj distingecoj al nuna uzitaj terminoj tiucele. Por ekonomiko kiel teorion kaj sciencon, esplorojn, precipe ekonometrion pro precizaj difinoj kaj simboloj, kaj plu fakojn, praktikan ekonomian vivon estas necese atingi precizajn signifojn kaj pli klare starigadi ligojn inter ekonomiaj fenomenoj sub distingitaj nomoj.

## FINA KOMENTO

Je la fino estas necese konkludi ke proponitaj neologismoj vere povas pliprecizigi Esperanton. Lingva analizo de koncernaj terminoj pri bazaj merkataj nocioj je la prezentitaj ekzemploj tre klare montras al problemoj de homonimeco kaj sinonimeco kiuj gvidas al plursignifaj terminoj. Neologismoj “ofro” kaj “domando” estas unikaj vortoj/terminoj nur por po unu signifo, estonte rekoneblaj laŭ bazaj merkataj fenomenoj kun plena senco kaj enhavo. Ĝisnunaj vortoj/terminoj “propon(ad)o”, “postul(ad)o”, “oferto” kaj “mend(ad)o” kiel substantivoj, inkluzive aliajn derivatajn substantivojn kaj verbojn restas en siaj signifoj en pli precizaj ampleksoj sen signifoj kiuj povos transpreni novkondukotajn neologismojn. Tiel oni perdas oftajn problemojn en interkompreniĝo kaj klarigado en kadro de sciencaj, fakaj kaj aliaj tekstoj kaj kunteksto. Enkonduki koncernajn vortojn en Plena Ilustirita Vortaro de Esperanto estas unua sekvonta tasko laŭaspekto de eldonaĵoj. Sed antaŭ tio estas necese turni al Akademio de Esperanto en celo por plipritrakti kaj aprobi proponitajn solvojn. En kazo de aprobo Internacia Lingvo gajnos novan kvaliton. Tielmaniere ILo estos preta por plibonigi ne nur lingvon mem, eĉ ekonomiko kiel sciencon kaj teorion unuflanke kaj ekonomian praktikon kaj faklaboron aliflanke, kio devas fariĝi avantaĝon de Esperanto kompare al aliaj lingvoj.

## LITERATURO

Uzitaj vortaroj

1. Aleksandrovich, E.-E.A. Bokarev: Esperanto-Ruski Slovar, Izdatelstvo “Ruski jazyk”, Moskva 1982.

2. Benson, P.: Comprehensive English-Esperanto Dictionary, Esperanto League for North America, USA, 1995.
3. Bormann, W.: “Trafiko – La merkato de trafikservoj” (Priskribo de la trafiko), studmaterialo por kurso dum la 11-a Sanmarina Universitata Semajno (SUS 11) en aŭgusto kaj septembro 1992 de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), eldonita de la aŭtoro en Hamburg, 1992.
4. Durand, D.: “Al merkatesploroj – notoj el du sinsekvaj staĝoj” atingebla sur TTT-paĝoj de IKEF ([www.ikef.info](http://www.ikef.info) aŭ [www.ikef.org](http://www.ikef.org)) sur menuo – eldonoj.
5. Economie Finance-Monnaie Glosaro de la Komisiono de la Eŭropaj Komunumoj 1985, versio esperanto – français – english, prizorgita de IKEF – Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, 1992.
6. Esperanta Vikipedio sur AIS en Vikipedio - <http://eo.wikipedia.org/wiki/AIS> - sur ekonomiko sub 2.1. Mikroekonomiko – terminoj ofertado kaj mendado;  
Retaj vortaroj de Esperanto kaj angla lingvo por Ido, Interlingua kaj Interlingue (Occidental).
7. Grazzini, C.: Vocabolario Italiano-Esperanto, Paolet-San Vito al tagliamento.
8. Gruić, F.-Pleadin, J.-Kocian A.-Šimunić, A.: Vortaro Esperanto – Kroatserba Kroatserba – Esperanto”, la 9-a eldono de ES “Liberiga Stelo” Osijek – “Koko” Đurđevac, 1989.
9. Hinšt, Z.: Kiel pli precize apliki ekonomiajn terminojn – tri kazoj kun multaj detaloj, Terminara Kuriero, n-ro 125, p. 4-6.
10. Hinšt, Z.: Rimarkoj pri la libro – Lingva analizo kaj proponoj pri la «International Business Dictionary in nine languages – Internacia komerca-ekonomika vortaro en naŭ lingvoj», La Merkato, n-ro 86 (oktobro 2004), p. 12-16 kaj n-ro 87 (januaro 2005), p. 7-12, atingebla ankaŭ sur retpaĝoj [www.ikef.info](http://www.ikef.info) aŭ [www.ikef.org](http://www.ikef.org).
11. Hinšt, Z.: Problemo de signifoj de ekonomiaj terminoj en Fervoja Terminaro (UIC Dictionary), La Merkato, n-ro 89 (julio 2005), p. 9-15 atingebla ankaŭ sur retpaĝoj [www.ikef.info](http://www.ikef.info) aŭ [www.ikef.org](http://www.ikef.org).
12. International Business Dictionary in nine languages – Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro en naŭ lingvoj, – English – Esperanto – Deutsch – Español – Français – Italiano – Nederlands – Português – Svensk, Kluwer Deventer – Antwerpen 1975, projektis, kompilis kaj redaktis F. Munnikisma (kun aliaj aŭtoroj).
13. Kaloczay, K.-Waringhien: Plena analiza gramatiko de Esperanto, Kvara, tralaborita, eldono, Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1980.
14. Krause, E.-D.: Taschen-Wörterbuch Esperanto-Deutsch, VEB Verlag Enzyklopädie, Leipzig, 1984.
15. Krause, E.-D.: Wörterbuch Deutsch-Esperanto, Veb Verlag Enzyklopädie, Leipzig, 1983.
16. Léger, R.-Albault, A.: Dictionnaire Français-Espéranto, Éditions françaises d’Esperanto, Marmande (lot-et-Garonne), 1961.
17. Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto kun Suplemento (PIV), Represo de la tria eldono, Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), Paris, 1987.
18. RailLexic 3.0., UIC, CD-ROM, Paris, 2002.
19. Sekelj, A.: Rečnik Srpskohrvatski-esperantski Serbokroata-Esperanta Vortaro, Beograd, Grafos, 1967.
20. Sindikata Terminaro, (Wiersch, H.), IKEF, junio 1997 – aprilo 1999.
21. UIC Railway Dictionary, Fervoja Terminaro, Esperanto-Français Français-Esperanto, Internacia Fervoja Unio, I.F.E.F. Terminara komisiono, Budapest, 1997.
22. UIC Railway Dictionary, Hungarian-English-German-French, Union Internationale des Chemins de fer, UIC RailLex, MAV Rt., Budapest – Frankfurt - Parisz, 1997.
23. UIC Railway Dictionary, Paris, 2005.
24. Wells, J.C.: Concise Esperanto and English Dictionary, Esperanto-English/English-Esperanto, 1969, St. Paul’s house Warnick Lane, London, English University Press.

25. Wiersch, H.: Borsa Terminaro Kvinlingva, Deutsch – English – Esperanto – Français – Nederlands, Komuna eldono, 2004, IKEF, Flandra Esperanto-Ligo, Esperanto 3000 vzw Leuven.
26. Wingen, H.: 1954, Wörterbuch Deutsch-Esperanto, Verlag der Limburger Vereins/Drückerei GmbH, Limburg/Lahn.
27. Zamenhof, L. L.: Fundamento de Esperanto, dekunua eldono, Edistudio, Pisa, 2007.
28. Živanović, S.-Gjivoje, M.: Rečnik Esperatsko-srpskohrvatski Esperanta-Serbokroata Vortaro, IKS – Internacia Kultura Servo, Zagreb-Edistudio, Pisa, 1979.

#### Leteroj

29. Leteroj – unua letero kiel reago de d-ro Werner Bormann al artikolo “Kiel pli precize apliki ekonomiajn terminojn – tri kazoj kun multaj detaloj“ en Terminara Kuriero n-ro 125 (julio 2005), aperinta en Terminara Kuriero 126 (oktobro 2005) kaj respondo de Z. Hinšt.
30. Leteroj – reago en privata letero direktita al Z. Hinšt de Ludoviko Sekereš de la 5-an de julio 2007 al artikolo “Kiel pli precize apliki ekonomiajn terminoj – tri kazoj kun multaj detaloj” en Terminara kuriero n-ro 125 kaj respondo de Zlatko Hinšt.